

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 15 fkoj
Bonfara : 20 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1974 6

KULTURAJ KAJEROJ

1974 NOVEMBRO - DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Kaj la kazeaĵo iĝis fromaĝo

La hidrokarbidoj en la antikvaj tempoj

Prelegoj en Grésillon
« Homoj kaj maŝino »
— **Maŝinoj kaj polucio** P. Métivier
— **Parolo kaj maŝino** A. Masclet

La rado, ĝia simbolismo

Voĉo en la tenebro

Dorota Zieminska (poemoj) trad. J. Smykalski

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatika demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

Kulturaj Kajeroj prezentas al siaj legantoj siajn plej korajn bondezirojn por la jaroj 1975.

El Grésillon

Ĉi jare, la unuan fojon jam de multaj jaroj, ni ne scias ĉu ni povos investi monon por plua modernigo de la kastelaj instalaĵoj. Rapida kaj tre granda altiĝo de la prezoj, necerteco pri la financaj rezultoj de la venonta jaro — ĉar, pro striko de la poŝto dum pli ol unu monato, ni ne povis ĝis nun fari la necesan propagandon —, la neceso konservi sufiĉe da mono en la kaso por fronti eventualan « nigran » jaron, jen la kaŭzoj de la haltigo de nia progresado, momenta haltigo ni esperas.

La 23an de marto la Kulturdomo malfermos siajn pordojn por akcepti geknabojn espereble el diversaj landoj, kiuj iom laboros kaj multe distriĝos en esperantlingva medio. Dum la sama semajno la pli aĝaj partoprenantoj povos ĉeesti teoriajn kaj praktikajn pedagogiajn aktivaĵojn. La duan semajnon oni dediĉos al kursoj kaj konversacioj.

La somero estos dividita en tri trisemajnaj periodoj. Dum la unua (1/7 - 22/7) kaj la tria (12/8 - 1/9) okazos la kutimaj ĉiam sukcesplenaj kursoj kaj kulturaj aŭ distraj aktivaĵoj. La dua (22/7 - 11/8) prezentos tre varian programon kun kursoj, prelegoj, ekskursoj, distraĵoj. Ni povos doni detalojn pri tiu periodo nur fine de januaro.

Ni alvokas ĉiujn amikojn al partopreno en iu au alia periodo. Jam pluraj sin anoncis, kiuj deziras retrovi la grezijonan etoson. Kaj vi, kiuj konas Gresillon nur per onidiroj, venu por mem vidi ĉu la kastelo kaj la parko estas tiel allogaj en la realo, kiel sur la fotoj ; ĉu la vivo tie estas tiel agrable plenigita de la libere elektitaj aktivaĵoj, kiel oni kutime diras. Rapide skribu por peti vian aliĝilon !

ATENTE LEGU LA LASTAN KOVRILPAĜON, PRO KELKAJ ŜANĜOJ EN LA ADRESOJ DE PERANTOJ. ANKAŬ LA ABONPREZOJ ŜANĜIĜIS PRO DUOBLIĜO DE LA PREZO DE PAPERO KAJ DE LA SENDKOSTOJ.

Esperanto tra la Mondo ★

LA UNIVERSALA KONGRESO EN KOPENHAGO

— La Loka Kongreso-Komitato aktivas en la dana ĉefurbo por kontentige organizi la 60an universalan kongreson (26-7 - 2-8-75).

— Prof Neergaard, specialisto internacie konta pri plantoj, akceptis oficii kiel rektoro de la Internacia Somera Universitato. Aliflanke, S-ro A. Venture estos la nova sekretario de la Belartaj Konkursoj, kiuj, krom la kutimaj literaturaj eroj, enkluzivos fakon « Fotografion ». Unu el la plej elstaraj modernaj poetoj en Esperanto, S-ro Baldur Ragnarsson (Islando) fariĝis nova prezidanto de la juĝkomisiono de tiuj konkursoj.

— La tuttagaj ekskursoj, jam skizitaj, verŝajne kondukos la partoprenantojn, unu trans la markolo al Svedio, tra la regiono Skanio, dum la alia celas al Fredensborg en Nord-Zelando (Danlando).

— La kongreso de blindaj esperantistoj okazos en Hillerod (20-26 de Julio). La infana kongreseto okazos en la internacia lernejo kaj infanvartejo de Bjorn, en Hellerup.

LA JUNULARA KONFERENCO EN FREDERICIA

En 1975, la gejunuloj renkontiĝos en Fredericia (Danlando) tuj antaŭ la universala, inter la 19-7 kaj la 26-7. La ĉeftemo de la aranĝo estos : « Kultura interŝanĝo ». (Ni memorigas pri la junulara renkontiĝo aranĝita en Francujo dum paska libertempo : 27-3 - 2-4-75, en Mantes-la-Jolie. Aliĝo J.E.F.O., 4 bis, rue de la Cerisaie — 75004 Paris).

LINGVISTIKA SIMPOZIO

Internacia Kultura Servo en Zagreb planas internacian lingvistikan simpozion kies titolo estas : « Esperanto kiel lingvistika bazo de meta-lingvo kaj kiel universala lingva fenomeno », en Zagreb (4-6a de Aprilo). Adreso : Internacia Kultura Servo, Amrusena 5/1, 41000 Zagreb, Jugoslavio.

MONUMENTA VERKO : « ESPERANTO EN PERSPEKTIVO »

Tiu verko de Prof. Lapenna kaj aliaj kunlaborantoj aperis komence de Decembro.

« Esperanto en perspektivo : faktoj kaj analizoj pri la internacia lingvo » enhavas 876 paĝojn, kun 65 paĝoj da ilustraĵoj kaj 40 paĝoj da indeksoj.

Tiu enciklopedieca volumego enhavas ĉion sciindan pri la historio, la nuna stato kaj la estonteco de la Internacia lingvo kaj ĝia movado.

Prezo : 84 nederlandaj gld., plus 10 % por sendkostoj.

ŜANĜO EN LA CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Ĉar prof. Lapenna eksiĝis el la direkcio de tiu centro, U.E.A. nomis alian respondeculon por tiu organismo. Li preparos raporton pri la estonto de tiu speciale grava agado. Estas Prof. Dro Janathan Pool, en Montréal.

Ĉiuokaze, per la redaktoriĝo de Prof. Dro Richard E. Wood (Usono), la revuo « La Monda Lingvo-Problemo » daŭre aperas.

ASOCIO DE INTERLINGVISTOJ

Grupo de esperantistoj, kiuj okupiĝas pri la scienca studo de la monda lingvo-problemo kreis asocion kaj komencas cirkuligi novaĵleteron. Redaktoro : S-ro Ulrich Lins, Gemarkenstr. 146, 5 Köln 80, F.R. Germanujo.

GRAVA ELDONAĴO EN RUMANIO

Ĝis nun, la situacio de la esperanto-movado estis malfacila en Rumanujo. Des pli ĝojiga estas la publikigo en tiu lando de 182-paĝa grandformata libro pri la analiza studo de la lingvo.

EN USONO

La lasta eldono de « Encyclopedia Americana » enhavas pli ol mil-vortan artikoleton pri Esperanto, verkitan de D-ro Humphrey Tonkin.

APERIS LASTTEMPE...

Krom la grava verko « Esperanto en perspektivo » oni notas, interalie, la jenajn novajn eldonaĵojn :

— « Esperanto-rusa vortaro » de E.A. Bokarev, 488 paĝoj (eldonita de « Soveta enciklopedio).

— « Noveloj de Lusin », plena kolekto, 488 p., dua kompletigita eldono en Pekino el la fama ĉina novelisto.

— « Kruko kaj Baniko el Bervalo » ... maldecaj anekdotoj por neprudaj legantoj, de Louis Beaucaire.

— Reeldono en « Dansk Esperanto-Forlag » de elĉerpitaj verkoj : « Judoj sen mono » de M. Gold (pri judoj enmigrintaj en Usono, fine de la antaŭa jarcento) ; « Anni kaj Montmartre » kaj « Verdkata testamento », de R. Schwartz. Apero de « Verda robo », moderna romano de J.-H. Rosbach.

— « Esperanto programita » de Hermann Behrmann, post la tradukoj el la germana originalo en la anglan kaj nederlandan, nun aperas en la sveda.

— « Literatura Mondo » vol. 1 ; unua volumo, presita en Japanujo, de la kompleta kolekto de la fama kaj altnivela literatura revuo (por ĉiuj ses volumoj : 300 gld.).

— « Premiitaj kaj aliaj noveloj » ; sep originalaj noveloj de T. Sekelj.

— Kursotekstoj de la Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo : « Lingvo, gentoj kaj lingva politiko » de Duc Goninaz, « Enkonduko en la organikan kaj biologian kemion » de S. Kawamura, « Elementa ekologio » de Stöp-Bowitz, « Fundamentaj konceptoj en Kemio » de S. Kawamura.

« UNIVERSALA LIGO » REAKTIVIĜAS

Post plurjara neaktiveco, oni klopodas reaktivigi la pacifistan kaj mondfederalisman asocion « Universa Ligo » bone konata de la malnovaj esperantistoj.

Adreso : Postbus 334, Bussun — 1351, Nederlando.

KAJ LA KAZEAĴO IĜIS FROMAĜO


Do, la kaptado de la tragelafo estis granda venko ; ĉion ĝi donis al la homo : karnon, ostojn, kaj ankaŭ tiun lanan haregon por plekti ŝnureton.

Kun kapoj ĉe kapoj, la maljunuloj instruas la junulojn.

Ja, oni devas gardi la brutaron kontraŭ la lupo kaj la aglo. Trovi por ĝi paŝtejon sur la montoj, kiam la somero sekigas la altebenaĵon ; sur la sudaj marbordoj, kiam la vintro brulas la herbon, la salo restarigas la bestojn. Tra la dezerta kamparo, kie la vento, per vasta mano, kuŝas la frenezajn herbojn kaj iliajn plumtufetojn, el meze de la ŝtonoj, la paŝtistoj malkovras la astrologion, la medicinon, la muzikon, eĉ, eble, la militistan arton kaj la regadon de la reĝejoj.

Ja, apartigi la virŝafojn ; gardi nur kelkajn en la brutaro ; tiuj fortegaj maskloj premegus la junajn kaj interbuĉus sin. Ilin konduki al la ŝafinoj nur en la bona momento de la jaro ; la ŝafidoj devas naskiĝi, kiam la suno eniras en la Ŝafosignon, ke la vintra malvarmo al ili estu malpli pereiga.

La ŝafino multe faras por la homoj ; per ĉio, kion ŝi donas ; sed multe pli per ĉio, kion ŝi petas ; ŝi estas tiom minacata ; el ĉiuj bestoj, ŝi estas la plej sendefenda, la plej timema ; necesas, ke la homo prenu ŝin sur sin ; tiom ofte li devas ŝin flegi ; al ŝi alporti, sub la ŝirmejoj, branĉojn en varmetigita akvo, aŭ kelkajn manplenojn da pli delikata furaĝo ; kiam ŝia momento estas, ŝi eĉ petas, ke oni ŝin akuŝu, kiel virinon. La ŝafino estas nur obeemo, kaj pacienco kun tuta manko de postulo.



Kion ŝi iĝus sen la paŝtisto ?

Ja, grave atenti la naskadon ; viŝi la jusnaskiĝintojn per fojno ; meti bovino-lakton en sian buŝon, ĝin tute varmetan enigi en la buŝon de la ŝafido por fortigi ĝian cerbon ; kaj kovri per salo tiun etulon, por ke la patrino ĝin leku kaj plej zorge ĝin atentu. Kiam venas la demamigo, por ke tiuj junaj kapoj ne plu mamsuĉu, fiksi. sur ilia nazo, pintojn de junipero. Kaj melki la ŝafinon, de kiu oni ĵus elprenis la idon .. la frizitan, altan sur ĝiaj kruroj.

Alia kutimo naskiĝis : ia tritiko-kutimo ; ĝi ete komenciĝis. La virinoj, per kurbigita bastono, fos-bastono, ĝardenis kelkajn lokojn apud la ŝirmejoj. En la koto stamfita kaj miksita kun la sterko de la bestoj, ili semis manplenon da grajnoj. La rikolto tenas en felsako. Verdire, tiu felsako estas vera revolucio°; ŝmirita per rezino ĝi povas gardi akvon kaj lakton.

La tritiko estas la fikshejma vivado ; estas Historio, kiu komenciĝas. Tiuj ĉi grundoj estas facile kultiveblaj per iloj el korno aŭ ligno. De tiam la tritiko estas ĉefaĵo por la homoj : legomoj, fruktoj, peklita viando estas malpli valoraj ; por la kamparanoj precipe pano kaj fromaĝo.

Necesis konstrui grenelojn, ŝirmitajn kontraŭ la pluvo ; ene la tritiko en ĵaroj. La homoj havas nur siajn manojn ; per kelkaj plakoj kaj slaboj ili konstruas rondajn kaj kvadratajn kabanojn ; larĝajn kaj longajn je du paŝoj ; la muroj estas altaj je tri futoj, same dikaj. Supere kalkaj plaketoj, bedon post bedo, pli kaj pli antaŭas por formi kupolon similan al kranio. La pordo : ĝin oni ŝtopas per branĉo-fasko, kaj frakseno ĝin ombras kontraŭ suno ; Kompreneble la tritiko-homoj iras tikladi siajn kuzojn kaj najbarojn, la homojn de la ŝafino, tiujn laktotrinkantojn ; tiun densan likvaĵon, kiel oni povas ĝin trinki ?

La tritiko ne sufiĉas al la homo ; li bezonas salon ; li ĝin trovas en la karno de la ŝafino kaj en ŝia lakto.

La fromaĝo, jen bona trovaĵo ! ĝi ne bezonis multe da genio ! ĝi tute sole fariĝas : sufiĉas, ke oni lasu la lakton en vazo ; ĝi kazeiĝas ; Kiel la sango faras nigran koagulaĵon kaj forlasas sian seron, same la lakto faras blankan koagulaĵon, forlasante la selakton. En la tempo de la ŝtono-hakiloj, la homoj volis fari fromaĝon, ne haltante antaŭ la lantecoj de la Naturo-Patrino. Ili inventis la muldilojn, kies truoj ellasas la selakton. Ili ilin lasis en Le Larzac.

Sur Kombalu, oni trovas ion multe pli bonan : legendon. Paŝtisto paŝtas siajn bestojn sur Kombalu. La aero estas dolĉa, kvazaŭ el bonfaraj blovoj, eĉ sur tiu norda flanko de la monto. La burĝonoj brilas sur la nudaj branĉoj de la ĉerizarboj ; ili pace balanciĝas en tiuj pasantaj ondoj. La violoj estas ĉie, duone kaŝitaj en la mortintaj folioj de la kverko ; ili ĵus eliĝis, preskaŭ sen petiolo ; ilia odoro alvenas kaj devigas al longa spirado.

La paŝtisto gardas kaj manĝas antaŭ la groto ; el sia panujo, li elprenis sian sekalopanon kaj sian ŝafinan kazeaĵon. Subite li stariĝas. Piede de Kombalu estas fluanta akvo. Li vidas, kiu malsupreniras tra la paŝtejoj, la filinon de sia mastro ; la junan kaj belan, tiun, kiu havas la koloron de la konvolvulo sur la vango kaj harojn kiel la flugilo de la merlo.

Hieraŭ li ŝin renkontis sub kverko ; ŝi lin rigardis el la profundo de siaj nigraj okuloj, kaj preskaŭ ruĝiĝanta ŝi liberiĝis kiel damaino, kiu eskapas. En li, lia sango turnis, kiel rado.

Nesciante kion li faras, li metas sur elstaraĵon de la roko, en la groto, sian kazeaĵon kaj sian panon. Kun la brutaro, li foriras. Li malsupreniras ĝis la valeto, al tiu nigrokula knabino.

Tie ŝi iras ; oni vidas ŝian sveltan korpon, similan al branĉido de avelujo ; ŝi iras al la rivereto por kolekti la bonajn herbojn : la katherbo, la lekanteto, la leontodo, kiujn oni manĝas kun kremo kaj salo.

Kaj jen ŝi stariĝas, relevante siajn harojn. Ho ! bruna cervino ! kiel ŝin vidi, ne donante al ŝi sian koron !

Li iras, ... kaj tiun ĉi tagon li ne revenis....

Li revenis alian tagon, tri lundaŭrojn pli poste. Sur la ŝtona elstaraĵo, en la groto, li retrovas la fromaĝon portantan iom da mucida pano. Kaj tiu bluiĝinta pano bluigis la kazeaĵon ; interne bluigis, kvazaŭ branĉetoj de timiano aŭ abrotano enen estus eniĝintaj.

Certe estas ia sekreto ; eble tiu aero, freŝigita, malsekigita, kiu blovas el la profundoj de la groto : Ja, la Spirito de Kombalu ! Tuj li komprenas : ĉi tio estas donaco de la ĝenioj : gaja nutraĵo. Kiel la bukedo de fragoj, tiuj dikaj ruĝaj gutoj sur la rando de musko kaj ombro.

El. H. POURRAT. (Historio de Roquefort).

La hidrokarbidoj en la antikvaj tempoj

De jarmiloj la petrolo ĉie montriĝis kaj la homoj sciis ĝin uzi kaj ekspluati. Kelkaj antikvaj verkistoj, Plinio, Plutarko, Strabono, Diodoro de Sicilio, ĝin elvokas en siaj verkoj ; jam la petrolo, kiu supraĵis la grundon kaj la gaso, kiu eskapis, facile brulis. « La babilona ebenaĵo estas vera flama naĝejo, granda proksimume je 25 aroj.

— En Etiopio, apud la monto Hesperius, la kamparoj, dum la nokto, ŝajnas stelplenaj. — La monto « Chimère » brulas kaj la flamo estingiĝas nek dum la tago, nek dum la nokto. La akvo akcelas la fajron. — La montoj Hefestaj flamiĝas tuj kiam oni alproksimigas torĉon. La ŝtonetoj kaj la sablo brulas en la sino mem de la akvoj. — Fajro-fontoj ŝprucas en la ebenaĵo de Apollonia (Selenitza-Albanio). — La flamoj akcelitaj de la pluvo lasas netuŝitaj la grundon kaj la gazonon ».

Uzo de la petrolo

La petrolaj produktoj likvaj aŭ solidaj estis nomitaj, laŭ greka aŭ latina esprimoj « asfalto kaj bitumo ».

Virgilo kaj Strabono parolas pri iliaj terapeŭtikaj valoroj : « Oni faras asfalto-fumigaciojn ; la nigra bitumo malbridigas la ulcerajn vundojn, kuracas la katarakton, la albugojn, la leprojn, la likenojn, la prurigajn afekciojn, la podagron, la dent-dolorojn, la histeriajn atakojn, la malnovajn tusojn kaj la malfacilajn spiradojn ».

La asfalto ankaŭ servis por flegi la viton. Per ĝi oni frotis la kupraĵojn por igi ilin pli rezistemaj al fajro. La loĝantoj de la alpaj lagaj loĝejoj ĝin uzis por tinkturi la statuojn kaj por protekti kaj vernisi la najlo-kapojn kaj la sagokapojn. La Egiptoj ĝin uzis por enbalzamigi siajn mortintojn.

La fajra petrolo ĉiam okazigis preskaŭ magian altiron ĉe la antikvaj popoloj ; ĝi inspiris multajn antikvajn religiojn ; 3 000 jarojn antaŭ Kristo la sumeraj magoj ekzamenis la petrolo-ŝvitadojn kaj la gaso-emanojn por diveni la estontecon. Antaŭ 5 000 jarojn la Sumeranoj ne rafinis la petrolon kaj uzis nur la bitumon aŭ la krudan nafton. Ili konis almenaŭ 6 specojn da petroloj ; ŝajnas, ke la plej uzata estis la densa bitumo, reziduo de la forvaporiĝo de la petrolo. La baseno de Suzo estas ĉirkaŭita de



Skulptita bitumo (3 mil jaroj antaŭ J.K.)

montetoj, kies rokoj elŝvitas bitumon. Estas la Suzo-situo, kiu liveris la plej grandan nombron da statuetoj kaj vazoj el bitumo (ellaboritaj 3 200 j. ant. K.).

Mezopotamio, Babilonio, Asirio, la Kaldeanoj, la Hebreoj, la Egiptoj ankaŭ uzis la petrolajn produktojn likvajn aŭ solidajn.

La bitumo en la konstruo

En Mezoriento, ĝi estis larĝe uzita kiel mortero. La Biblio ĝin elvokas pri Babel-Turo. Ksenofono rakontas, ke « en Medio, la muroj estas el kuiritaj brikoj metitaj en bitumo, kiun oni ankaŭ uzas por konstrui la pilierojn, la arkadojn, kaj la volbojn ; el ĝi oni ŝmiras la pordojn, oni likimunigas la ŝipojn ».

Hodiaŭ kelkaj niaj ŝipoj estas el plasto, kiu venas el petrolo. Antaŭe, en Mezopotamio, laŭ jarmila tradicio, la boatoj pezaj kaj rondaj estis el kanoj kaj bitumo. Laŭ la Biblio, la arkeo de Noa estis interne kaj ekstere ŝmirita per bitumo. Malgrandaj ujoj el junkoj aŭ kanoj povis enteni akvon, kondiĉe ke oni ilin ŝmiru per bitumo ; la naĝanta lulilo de Moseo estis tiamaniere farita.

Hejtado kaj lumigado per petrolo

Ligno ĉiam estis rara en Mezopotamio kaj la Babilonianoj brulis asfalton por sin varmigi. Tiu petrolo anstataŭis la bestan kaj vegetalan oleon en la lampoj ; odoro kaj fumo certe estis tre malagrablaj ; oni ankoraŭ ne konis la vitran tubon de niaj modernaj petrolo-lampoj.

La Romianoj ankaŭ uzis la petrolon por la lumigado ; ĝi estis ankaŭ la brulaĵo uzata en la centra hejtado kaj por varmigi la akvon de la popularaj termobanejoj ; ekzemple en Konstantinopolo. Ili lubrikis la radojn de siajn ĉarojn per bitumo.

Petrolo-distilejoj ĉe la Inkaoj

En Ameriko, la Aztekoj uzis petrolon por likimunigi la vazojn el tera koto, la akvajn kondukilojn kaj la rezervujojn. Bastonetoj el bitumo, kun aromaj herboj, brulis kiel incenso. Oni ĝin uzis en pentrado, kiam la nigra koloro estis necesa. Sur la bordoj de la lago Titikaka la hispanaj konkerantoj trovis unu el la unuaj petrolodistilejoj. La petrolo estis lokita en grandaj terkotaj ujoj eksponitaj sub la suna varmo ; laŭmezure ke la temperaturo pliiĝis, la likvaĵo fluis en aliajn subajn vazojn. Saman distilejon oni trovis en Peruo.

En Azio, antaŭ 2 200 jaroj la Ĉinoj malkovris flamiĝeman gason. Tiu gaso, pura kaj malmultekosta, estis kaptita en kanalaro el bambuoj, praulo de niaj petroloduktoj. En Japanio oni malkovris petrolo-putojn, fosigitaj en 615 de homa mano. Sed estas en Birmanio, ke la ekspluatado estis la plej prospera. La petrolo ekstraktita el putoj servis por hejtado, lumigado kaj kuirado de la nutraĵoj. Oni ankaŭ ĝin eksportis al Hindio.

Timigaj armiloj

Laŭ Tucidido veraj flamĵetiloj servis por ataki la remparojn ; la sagoj foren portis la fajron. La sago el kano estis garnita je feraj bendoj kaj formis ujon, kiun oni plenigis per flamiĝema materio. La akvo akcelis la intensecon de la fajro, kiun oni povis estingi nur per polvo. La soldatoj brulis kun siaj armiloj.

En Mezepoko la Krucistoj de Saint-Louis estis terurigitaj, kiam ili renkontis la fajron « gregeois » de la Araboj.

De la 8-a jarcento la Araboj, iom post iom, transdonis al la mondo sian sperton pri tiu milita fajro, bazita sur petrolo ; ĝi prezentiĝis sub tri formoj :

— ŝtonoj envolvitaj en flama stupo aŭ linaĵo,

— vazoj el tera koto, kiuj estis veraj grenadoj ;

— kaj likvaĵa fajro « la gregeois fajro ».

De la 13-a jarcento ĉiuj nacioj uzis tiun ĉi fajron.

PRELEGOJ DE GRESILLON

" HOMO KAJ MAŜINO "

Sub tiu titolo, ni intencas publikigi kelkajn el la prelegoj faritaj en Gresillon dum la Internaciaj Semajnoj de la somero 1974. La prelegintoj bonvolis skribi resumon de sia parolado. Ni tre kore dankas ilin. Fakte, la tekstoj kiuj aperos en la venontaj numeroj de Kulturaj Kajeroj estas nur resumoj kaj ne povas anstataŭi la diritajn prelegojn kaj la sekvantajn diskutojn kiujn konas la esperantistoj kiuj iam ĉeestis la Internaciajn Semajnojn de Gresillon. Ni esperas ke tiuj tekstoj montros al la esperantistoj kiuj neniam ĉeestis tiujn periodojn aŭ kiuj ne venis dum longa tempo ke ili mankas multon... kaj ke ili decidos veni aŭ reveni !

MAŜINOJ KAJ POLUCIO

Karaj Geamikoj,

Mi-mem ne elektis la titolon, tamen mi konsentis ĝin pritrakti. Pri la vorto « polucio » ni jam multe aŭdis kaj ne plu necesas klarigi detale ĝian signifon. Ĝi estas bedaŭrinde ĉie aktuala. Sed, kiam aperas tute apude la alia vorto « maŝinoj » ŝajnus ke oni tre simple trovis kulpulon.

Ne imagu ke mi intencas aplombe kondamni la maŝinojn. Mi opinias ke estas pli saĝe analizi, juĝi la situacion. Do, hodiaŭ la kastelo Grésillon fariĝos tribunalo...

Oni devas unue distingi inter maŝinoj tiujn multnombrajn kiuj en ĉiuj utilaj laboroj alportis al la homoj veran helpon, plifaciligis la ĉiutagan laboron kaj samtempe ne kaŭzas polucion. Mi devas konfesi ke ankaŭ mi, iam en junaĝo, multe admiris la maŝinojn — ĉiujn inventaĵojn, laŭdis la teknikon kaj ĝian disvastiĝantan aplikon kun la granda espero ke tio estos feliĉo por la homaro estonte. Mi estas certa ke milionoj da homoj tra la mondo same pensis, same revis kaj esperis.

Ĉar ĉiu individuo estas normale influata de sia medio, mi povas konfidi al vi ke en nia agrikultura mondo, ĉe niaj kamparoj antaŭ nur 30 jaroj la teknika progreso tute ne aperis. Ni nur aŭdis pri la ekzisto de maŝinoj sed ni ne vidis ilin. Eĉ ofte ne estis la elektra kurento en la farmoj. Plenumis la laboron nur homoj kaj bestoj. Jen do bona kondiĉo por esperi, por revi, por plej arde deziri ke la maŝinoj, nur nebule imagitaj, venu je nia helpo.

Tute aparte mi volas mencii la elektran forton kiu en la farmoj devis pli malfrue alporti valoran helpon. Krom la lumo kiu estis grava problemo ĝi ebligas pli facile pumpi akvon kaj movadi plej diversajn aparatojn. Kaj tio efektiviĝas sen brue, sen granda danĝero. Preskaŭ ne rimarkeble disvastiĝis la uzo de maŝinoj en agrikulturo kaj same en ĉiuj branĉoj de la homa aktiveco.

Kaj, jen subite aperas la granda problemo de la nuntempo. La homaro surprize konstatas kun timo la rezulton de sia senbrida klopodo konstrui kaj uzi maŝinojn. Ĉie regas bruo, fumoj sufokas, trafiko inferas, grandaj kamparaj areoj ebene dezertiĝas. La homoj rapidas konstante. Oni urĝe kuras al la celo kiun oni ne atingas ĝustatempe malgraŭ ĉiuj mirindaj veturiloj je dispono. En tiu akcelita ritmo kiu ne estas laŭ homa dimensio, ne eviteble ŝanceliĝas la mensa ekvilibro.

Kio do okazis ?

Ŝajnas ke en la lastaj jardekoj ni ĵus travivis kvazaŭ frenezan epokon kies ĉefa orientiĝo estis eltrovi maŝinojn por ĉiuj farendaj laboroj — eĉ la plej malgravaj. Oni celas anstataŭi la homon kiu estas forpuŝata de sia propra kreaĵo.

En la industrio kaj ankaŭ en agrikulturo, tio kondukis al produktado de danĝeraj ingrediencoj, venenaj substancoj stulte ĵetataj ĉu en la maroj, ĉu en la riveroj, ĉu en la aero sub gasa formo K.T.P. Tio estas la rekte videbla materiala polucio. Sed alia fenomeno same grava estas konstatebla :

La homoj estas konstante malkontentaj. Ili ne plu sentas sin utilaj. Ĉu ne estas strange konstati ke la admirinda kapableco de la homa cerbo kiu sukcesis vivigi la materion, krei motorojn, inventi plej perfektajn maŝinojn — ne sukcesis protekti la vivĝojon en la homa animo ?

La alte teknika nuntempo atribuas valoron prefere al la maŝinoj. Oni volas havi ilin en ĉiuj anguloj de la domo. Homaj manoj ne plu estas konsiderataj. Miloj da kamparaj homoj tra la mondo fuĝas al la urboj kie infere bruas la uzinoj. Ili fariĝas nuloj vivantaj sencele en artefarita medio. Nur la teknika elito gajnos sufiĉe por iri spiri de tempo al tempo iom da duonpura kampara aero. Dume, en agrikulturo, pro adoro al la teknika idolo, oni ŝprucas venenon sur la kampoj por ĝisekstreme mortigi la naturon rompi la biologian ekvilibron.

La homo ĉiam revis pri pli bela vivo estonta, pli agrabla, malpli peniga laboro. En multjarmila klopodado la homoj inventis kaj perfektigis ilojn admirindajn kiuj elegante alportis helpon al la necesaj laboroj. Ĉiuj metiistoj havis la impreson esti utilaj kreantoj kaj la uzantoj trovis en siaj iloj intimajn akompanantojn kiuj ebligis plenumi harmonie la laboron.

La nuna kompleta transformiĝo de la homa socio ŝokas. Kial do ni antaŭenpuŝis la teknikon ĝis tiu grado giganta ? Oni preferos longe eksperimenti kaj konstrui monstrajn maŝinojn kiuj kostas enorman sumon ol dungi salajrulojn. Tio estas — oni diras : racia solvo pri profita problemo. Ĉu ne gravas ankaŭ la vivo de la homoj ? Ĉar ni ne forgesu ke homoj sen rimedoj povas malsate morti apud maŝino giganta kies produktaĵo estas atingebla nur pere de mono. En la uzinoj oni produktas grandskale. Rapide, sed laŭ seria metodo kie la homo estas vera sklavo de la infera maŝinaro. Ankaŭ, oni ĉiam pli produktas malbonkvalitajn aĵojn kiuj estos rapide eluzataj kaj ĵetataj al rubejoj : tio estas kutimo. Plej bedaŭrinda apliko de la moderna tekniko en la agrikulturo estas la forigo de la heĝoj, la kunigo de la parceloj por racia utiligo de la grandaj maŝinoj. Tio kaŭzas duoblan malbonon. Unue : atenco kontraŭ la harmonion de la pejzaĝo — kaj kontraŭnatura efiko al la sana ekvilibro de la grundoj pro erozio, vento, K.T.P.

Kaj, dume, en ĉiuj profesioj oni daŭre febre aktiviĝas por postuli sensukcese ĝustan prezon por la farita laboro. Ĉu tio estas la revita paradizo ?

Mi ne volus kondamni la maŝinojn ĉar mi admiras kaj aprezas la homan intelekton kiu estas kapabla fari mirindaĵojn, sed estas necese halti saĝe sur tiu vojo antaŭ la danĝera limo. Kaj, mi opinias ke la homaro komencas nun fari alian revon. La homo deziras esti denove utila vivantaĵo. Li ne plu devas esti la viktimo de invadanta tekniko sed esti digna kaj libera kreanto. Tio estas la natura kondiĉo de la homo pensanta. Ĝi ne povas toleri longatempe esti perforte subigata al senforma teknika vivmaniero.

Pierre METIVIER.

PAROLO KAJ MAŜINO

Oni diras, ke la parolo estas propraĵo de l'homo, kaj nur en sciencfikciaj libroj oni vidis parolantajn maŝinojn ĝis antaŭ kelkaj jaroj. Sed nun tiajn maŝinojn oni konstruas. Tio devenis de la disvastigo de la komputora uzado.

La komputoroj iĝis pli kaj pli grandaj, rapidaj kaj multekostaj. Ili povas fari multajn laborojn, irante de unu al la alia tiel rapide, ke ili ŝajnas fari tiujn laborojn samtempe. Oni pensis : se pluraj personoj uzas la saman komputoron samtempe, la uzadon iĝus malpli kosta.

Por fari tion oni bezonas aparaton, kiu povas sendi informojn kaj ricevi respondojn. Unue oni uzis tajpmaŝinojn, aldonante elektrajn ŝaltilojn al ĉiuj klavoj por sendi informojn al la komputoro. La respondojn la maŝino aŭtomate tajpis.

Sed kiam kvindek personoj samtempe laboras, oni bezonas kvindek tajmaŝinojn. Kaj ankaŭ tio estas multekosta.

Do oni bezonis aparaton povantan komuniki kun komputoro kaj kiu kostas preskaŭ nenion. Aparato kiu kostas nenion simple estas aparato kiun oni jam havas kaj uzas por alia celo. Fine oni pensis pri la telefonaparato. Ĉiuj havas ĝin en laborejo. Do oni ne bezonas aĉeti ĝin. La telefonaparato povas sendi informojn per la diska numerilo sed ĝi povas ricevi nur parolojn.

Tial oni konstruis elirejon de komputoro kiu povas paroli kiel la homoj.

Unue oni uzis maŝinojn kiuj funkcias kiel magnetofono. Oni metis sonbendojn sur granda cilindro, unuj apud la aliaj, kaj surbendigis sur ĉiu malsaman respondon.

La komputoro elektis la sonbendon kiu enhavas la deziritan respondon.

Sed tiuj respondoj estis malmultaj ĝenerale kelkaj dekoj ĉar alie la cilindro devus esti grandega kaj oni renkontus mekanikajn problemojn.

Tamen tiaj maŝinoj ankoraŭ nun ekzistas.

Ili sufiĉas kiam la respondoj estas nur nombroj. Oni metis la dek ciferojn sur dek sonbendoj kaj la maŝino literumas la nombron dirante la ciferojn unu post la alia.

Ekzemple : por diri mil du cent tridek kvar la maŝino diras unu du tri kvar.

En Usono estas tia maŝino kiu sendas per telefondratoj la prezon de la diversaj akcioj en la Nov-Jorka borso.

Sed por pli grandaj kaj multnombraj respondoj oni bezonis pli grandan memoron. Fine oni pensis : komputoro havas grandan memoron. Kial ne uzi ĝin ?

Bedaŭrinde la komputoro konas nur du ciferojn : unu kaj nulo. Do oni devis kodi la parolajn respondojn kaj pro tio oni studis la homan voĉon.

La homa voĉo estas sonoj elirantaj el la buŝo. Tiuj sonoj estas produktitaj de vibradoj de l'aero.

La homa parolaparato konsistas el la pulmoj kiuj sendas aeron, la voĉkordoj kiuj estas membranoj vibrigante tiun aeron kaj la buŝo.

La voĉkordoj povas vibri de 70 ĝis 150 foje dum unu sekundo por la viroj kaj de 120 ĝis 300 foje dum unu sekundo por la virinoj.

La nombro de vibradoj dum unu sekundo estas la frekvenco kaj la unuo de frekvenco estas la herco. Kiam io vibras 100 foje dum unu sekundo ĝia frekvenco estas 100 hercoj.

Kiam oni analizas la aeron enirantan la buŝon tra la laringo, oni trovas ne nur la vibradon de la voĉkordoj sed ankaŭ ĉiujn multoblojn de tiu vibrado.

Ekzemple : se la voĉkordoj vibras je 100 hercoj, oni trovas vibradojn de 100, 200, 300, 400, 500 ktp hercoj.

Sed kiam oni analizas la aeron elirantan la buŝon oni trovas nur kelkajn el tiuj multobloj. La buŝo laŭ ĝia formo, laŭ la pozicio de la lango elektas parton el la vibradoj.

Kaj la prononcita sono dependas de tiu elekto.

Ekzemple : dum la prononcado de la sono A la buŝo elektas la multoblojn de la voĉkorda vibrado kiuj ĉirkaŭos 1 300 kaj 2 500 hercoj.

La sono I estas prononcita kiam la buŝo elektas la multoblojn kiuj ĉirkaŭas 400 kaj 2 500 hercoj.

La voĉkordoj ne ĉiam vibras. Ili nur vibras kiam oni prononcas vokalojn. Dum la prononcado de konsonantoj la voĉkordoj ne vibras. La aero trairante la trakeon produktas bruon kaj la buŝo same elektas parton de tiu bruo.

Por kodi oni analizas la deziratajn vortojn prononcitajn de bona parolisto. Oni mezuras la frekvencojn de la multobloj de la voĉkorda vibrado. Oni ankaŭ mezuras la nivelon de tiuj multobloj.

Pere de kodo oni transformas tiujn informojn en sekvo da ciferoj unu kaj nulo. Oni enmemorigos tiujn sekvojn en la komputoro. La programo de la komputoro scias en kiu parto de la memoro estas ĉiu vorto. Do kiam la maŝino volas sendi respondon, ĝi prenas en la memoro la deziratajn koditajn vortojn kaj sendas ilin al la voĉelirejo.

La voĉelirejo funkcias same kiel la homa voĉaparato. Ĝi rekonstruas la voĉkordan vibradon indikita en la kodo. Grupo da filtroj elektas la bonajn multoblojn de tiu vibrado sub la kontrolo de la kodo kaj la rekonstruitan voĉon oni sendas sur la telefondratoj.

La maŝino povas sendi ĝis ok respondojn samtempe kaj la komputoro povas sendi tiujn respondojn farante samtempe alian laboron.

Usona stacidomo havas unu el tiaj maŝinoj. Ĝi donas telefone ĉiujn informojn pri la horaro de la vagonaroj. Sufiĉas sendi al ĝi la numeron de la urbo kie vi deziras iri.

Unue vi vokas la maŝinon per via telefonaparato. Due vi sendas al ĝi la numeron de la urbo per la diska numerilo kaj tuj vi aŭdas la respondon.

Kion alportas al la homoj tiaj maŝinoj ?

La unua celo estis profito. Oni uzas ilin por gajni monon, ŝpari tempon. La maŝinoj estas pli rapidaj kaj pli efikaj ol la homoj.

Tamen ili ne anstataŭas homojn.

Sed tiuj maŝinoj havis neatenditajn rezultojn. Ĉar ili funkcias kiel la homa parolaparato, oni pensis uzi ilin por studi la homan aŭdaparaton :

Oni bone kontrolas la maŝinan parolon. Ŝanĝante la koditajn vortojn oni antaŭe scias kion oni devus aŭdi.

Kelkaj surduloj aŭdas nur la vibradojn kies frekvenco estas malpli granda ol 150 hercoj. Ŝanĝante la koditajn vortojn per programo oni povas aŭdigi ilin al tiuj surduloj.

Fine oni malkovris kiamaniere fabriki vortojn sen uzi homan parolon, nur uzante komputoron. Tio malfermas alian vojon. Oni povas konstrui maŝinon kapablan laŭtlegi, tre gravan por la blinduloj.

Sed por tio oni bezonas tute fonetikan lingvon kies vortoj skribiĝas kiel oni prononcas ilin. Ĝis nun nur Esperanto estas tia lingvo.

Eble tiaj maŝinoj estas gravaj por nia movado.

Konklude tiaj maŝinoj kiel ĉiuj maŝinoj estas nek bonaj nek malbonaj. Nur ilia uzado povas estis bona aŭ malbona sed tio dependas de la homoj mem.

A. MASCLET.

LA RADO, ĜIA SIMBOLISMO

La Rado simbolas la movantan cirklon. En ĉiuj tradicioj la cirklo estas la bildo de la Perfekteco. En psikologio ĝi estas la Tuteco de la animo kaj de la spirito. En la religioj ĝi estas la signo de la Absoluto. La moviĝanta rado simbolas la evoluadon de la mondo kaj ties bonordon.

Suna simbolo

En la Eŭrazia mondo, de Oural ĝis Pacifiko, la bildo de la rado konfuziĝas kun tiu de la Suno, kiun certaj triboj nomis la ĉiela rado ; ĝi montriĝas sur la surrokaj gravuraĵoj de Angara kaj Oural, sur la amuletoj de la suda Rusujo, kaj sur tiuj de la Mandĉurujaj ŝamanoj.

En la antikva semida Oriento, 3000 ant. K., aperas, inter la geometriaj desegnoj, la cirklo kaj la svastiko, ankaŭ suna emblemo. Jam de la unuaj tempoj, en Mezepotamio, la O reprezentas la perfektan nombron : dividita en 360 gradojn, ĝi esprimas la 360 tagojn de la jaro, kiu estas 12 monatoj po 30 tagoj, ĉiu tago nombrante 12 duoblajn horojn. La « granda nombro » 360 estis dirita SHAR, kaj signifis la Totalecon. De la cirklo kaj de la nocio de tempo naskiĝis la Rado, simbolo de tempo-periodo. Ĉirkaŭ 2500 ant. K., naskiĝis en Sumero la komplekso ĉielo-tero. En Babilono, la poemo de la Kreado elvokas, elmerĝantaj el la primitiva kaoso, la Altan Totalecon kaj la Malaltan Totalecon, montritaj per cirklo kun la indikoj Alto, Malalto. La diaĵoj, inter kiuj Iŝhtar tenas en mano cirklon kaj svastikon. En la komenco de la unua krista miljaro, en Luristan, la Rado, suna cirklo, kelkfoje montras la Patrino-Diinon portantan infanon.

La kruco, kiun oni trovas jam en Our (Sumero) apud la Persa golfo kaj en Kreto, dum la malproksima arkaika epoko, en Ameriko antaŭ Kristoforo Kolumbo kaj la hispana okupado, havas, en tiuj civilizacioj, la formon de majuskla T, kelkfoje surstarita de cirklo aŭ ovalo. « La krista kruco elrompis la radon ; ĝi ne plu estas la simbolo de senĉese ripetita rondiro, sed tiu de ekspansio ; ĝi ne plu havas limojn, ĝi ekposedas ĉiujn direktojn de la spaco, kiun ĝi organizas ĉirkaŭ siaj aksoj ». La cirklo, tamen, daŭre elvokas tion, kio estas ĉiela : la dia-trono ĉiam staras sur cirklo, kelkfoje el nuboj.

« Islamo, ankaŭ ĝi, rompas la Radon. La krescento, kiu figuras sur la standardoj, kaj estas emblemo de tuta civilizacio, estas la bildo de cirklo, kiu ne plu fermiĝas sur sin mem, sed malfermiĝas al ĉiuj ebloj, laŭ la dia volo ». La Tempo-rado restas persa poezia bildo. En la islama arkitekturo, la dueco Tero-ĉielo montriĝas per la kupolo lakita sur kuba maŭzeolo. La Ka'ba, en Mekko, estas nigra ŝtono kuba, lokita meze de cirkla spaco. La kultantoj kuniĝas en kvadrata ĉambro, surstarita de kupolo, nur inda por reprezenti la nemezureblan dian grandecon. La spaco inter kvadrato kaj cirklo kondukis la arkitektojn al plej diversaj dekoraciaj formoj.

Cirkla irado : kosma simbolo

La rotacia danco de la ĝirantaj dervišoj figuras la rondon de la planedoj ĉirkaŭ la suno, dum ilia movo taga kaj jara, kiun ili konis jam 4 jarcentojn antaŭ Galileo ; ĝi havas pli profundan simbolon : pro la analogio inter mikrokosmo kaj makrokosmo, la homa animo estas speguliĝo de la suna sistemo : ĉirkaŭ la dia animo turniĝas la Kreitaro. En Mekko, la pilgrimo postulas sepoblan ĝiron ĉirkaŭ la Ka'ba.

En Hindujo estas sunaj ĉaroj dediĉitaj al la dio Suno, honorigita en la brahmanisma religio. Tiu de Konarak, ne malproksime de Bengalo-golfo, datiĝas de la 12-a jarcento ; la tuto estas giganta ĉaro el ŝtono tirata de 7 galopantaj ĉevaloj ; ĝi havas 12 parojn da radoj ; la plej grandaj havas diametron 3-metran kun 8 plenaj radioj por montri la ĉefpunktojn kaj ties interajn punktojn ; 8 aliaj radioj akompanas la iradon de la suno. La radringo kaj la radioj estas detale skulptitaj. La elstaraj naboj figuras korolojn de 8-petalaj lotusoj.

Rado kaj cirklo montriĝas sur la monumentoj antaŭkeltaj kaj keltaj. Ili estas gravuritaj en la ŝtono de la dolmenoj en Bretonio kaj Britujo. Stonhenge kaj Avebury estas la plej belaj ensembloj diskoformaj ; ilia lasta ĉirkaŭo, kiel hufofero malfermiĝas al la oriento, ĵus direkte al la punkto de la leviĝanta suno, en la tago de la ekvinokso. La keltaj krucoj (ĉirkaŭ 200) kunigas la druidan cirklon kun la krista kruco. Oni ilin trovas en Irlando, Kimrujo ,Skotlando kaj Monks-insulo ; precipe en la cirkla ĉirkaŭaĵo de la malnovaj irlandaj abatejoj. La irlanda oraĵarto la lignaj skulptaĵoj montras svastikon en cirklo. Gallaj literaturo kaj tradicio elvokas radon ; la gallaj statuoj de Tanaris, alia Zeŭso, portas 6-radian radon. Pli poste ankaŭ Sankta Katerina havos radon.



Radforma tombŝtono de teksisto

Rado kaj rozvitralo en la mezepoka simbolismo

En Saintonge, la marmoraj merovidaj sarkofagoj portas radon kun 6 aŭ 8 radioj. Tiu rado ankaŭ ornamas la centron de pli ol unu romanika timpano. La akso estas la dia principo, la ĉirkaŭaĵo estas la Kreitaro, la Universo. Multaj bizancaj ikonoj montras Elie sur sia fajra veturilo. Ezekiel aperas sur enorma radiita rado en scintilanta vitralo. Sur la vitraloj de la baziliko S-t Denis oni vidas la korpon de la Krucumito en ĉaro. La rado unuigas la teron al la ĉielo. En S-t Aignan (Orléans) oni povas vidi kuriozan relikvujon (12-a j.) ; ĝi estas ĉaro ; la radoj havas 6 radiojn ; ĉiu el tiuj ĉi estas fiksita al la radringo per duoncirklo ; tiuj radoj tute similas la rozvitralojn de la grandaj gotikaj katedraloj (Charles, Notre-Dame de Paris), kiuj es-

tas veraj ŝtonaj floroj kun scintilantaj travideblaj petaloj. La strukturo dekdu-uma de la plej antikvaj rozvitraloj montras la aspekton propre zodiakan de ilia kosma signifo ; tiu aspekto ankaŭ kelkfoje figuras en la ikonografio de iliaj medalionoj.

La radoj hirtigitaj je glavoj estis martir-instrumentoj por Sta Georgo reprezentita en vitralo de Chartres ; por Sta Savin ; por Katerina de Aleksandrio, kiu konvertis, oni diras, 50 doktorojn en filozofio turniro ; la ĉiela rado, kiu ŝin akompanas, estas la emblemo de la filozofia scienco. La aŭreolo de la sanktuloj, la krono de la reĝoj sendube estas rado ĉiela.

Diskoformaj tomboj en Vaskolando

En la tombejoj de Vaskolando oni trovas ŝtonajn monumentojn, kun skulptitaj diskoj. Ili montras la svastikon kaj la sunan radon al kiu oni almetis la metiajn simbolojn de la mortinto : kombilo, tondilo, naveto de la teksisto, plugilo de la kampulo, plandumo de la ŝuisto.

La eksterordinaraj pentraĵoj de Jerôme Bosch (16-a j. c.) organizĝas laŭ cirklaj linioj. Precipe la kurioza Tablo de la ĉefpekoj (en Prado). En la centro Kristo eliras el sia tombo ; 128 radioj servas kiel perantoj inter Kristo kaj la alegorioj de la ĉefpekoj.

LA RADO DE FORTUNO


La movebleco de la rado asociiĝis al la pasado de la Tempo, al la moviĝema karaktero de la vivo, al ties ŝanĝiĝoj ; ĝi iĝis la Rado de la Fortuno. Ĉe la Grekoj ĝi estas malofta ; la tragikaj verkistoj rigardas la individuojn kiel fortojn baraktantajn kontraŭ la fataleco. Tamen Sofoklo diras : « Kiel rado la Fortuno rondiras ». Sur ceramiko kaj orelringoj Afrodita kaj Eroso tenas la ŝnurojn sur kiuj turniĝas la rado, bonefika aŭ malbonfara por la geamantoj. Klemento de Aleksandrio (200 j. ant. K.) raportas, ke rado estis lokita sub la portikoj de la egiptaj temploj ; enirante oni igis ĝin turniĝi. Ĉe la Romianoj Agatha Thyche, diino de la urbo, prenas la nomon Fortuno ; certaj moneroj ĝin reprezentas kun rado ĉe ŝiaj piedoj. Horace, Ovide atestas, ke dum la rita sorĉkanto, oni kontraŭdirekte turnis la magian cirklon. Bosce, senatano roma en la 5-a jarcento, tenita en granda favoro kaj poste enkarcerigita, komponis la « Filozofia Konsolo », en kiu li dialogas kun Filozofio kaj Fortuno. Tiu ĉi lasta rapide turnas radon al kiu homoj alkroĉiĝis, kaj diras : « Mi amas suprenlevi tion, kio estis malsuprenigita, kaj malsuprenigi tion, kio estis suprenlevita ». En senĉesa movo tiuj, kies potenco kaj riĉeco estis grandaj, ofte estas deĵetitaj en malriĉecon kaj mizeron. La Fortuno-rado estis mezepoka temo en la poezio, la skulpturoj, la miniaturoj, Jean de Meung en la Romano de la Rado, Adam de la Halle en la Ludo de la Foliaro, rondirigas, sur sia rado, la riĉulojn de la urbo.

Ĉirkaŭ la rozvitraloj de Verono, Bazelo, Trento, Amiens, Beauvais, sur unu flanko de la rado la personoj supreniras ; ili malsupreniras sur la alia flanko ; ĉe la supro tronas la momenta favorato de la Fortuno. Estas averto pri la fragileco de la homaj okazaĵoj. Tiu Fortuno-rado figuras en la 12-a jarcenta germana manuskripto. La sama temo retroviĝas ĉe Danto kaj Petrarko. Kurioza 14-jarcenta desegno prezentas strangan mekanikon per kiu ludas Fortuno : jen du radoj, unu estas rapida, la alia lanta ; interne 2 radoj turniĝas en kontraŭa senco. La Libro de la Fortuno de Jean Cousin (16-a j. c.) montras ĉirkaŭ 200 desegnojn ; ĉi tie Fortuno manifestiĝas en ĉiuj medioj : kutimoj, moroj socialaj konceptoj. Germana akvaforto (1620) bildigas, ĉirkaŭ la Fortuno-rado, la Papon ĉirkaŭitan de religiuloj ; tiuj ĉi havas bestan kapon de otuso, porko, hundo, kato, simio, azeno kaj de frenezulo.

Sed, pli poste, Fortuno estos reprezentita nur kiel antikva nuda diino.

RADOJ KUN SONORILETOJ

La sonoriletoj estis konataj en preskaŭ ĉiuj popoloj de la antikvaj tempoj : en Ĉinio, en Persujo, ĉe la Hebreoj, Grekoj, Egiptoj. Ŝajnas ke estas en Egiptujo, ke oni trovas la unuan sonorileton dediĉitan al Oziriso. En Germanujo, Hispanujo, Britujo, Francujo (ĉirkaŭ 20 en Bretonio) la rado de Fortuno ornamiĝis je sonoriletoj ; kvankam en preĝejoj tre prilaboritaj, tiuj radoj estas tre simplaj, nek skulptitaj, nek pentritaj. Ili havas diametron 1 metran (1,75 m. en Confort). La katedralo de Fulda, en Germanujo, posedis fantastan radon kun diamentro 8-metran, pezo 500 kg., kaj portanta 350 sonoriletojn ; tiu rado datiĝis de 1415 kaj anstataŭis radon multe pli antikvan. En 1781 ĝi falis kaj oni ĝin nek konservis, nek restarigis. Tiuj sonoriletoj anoncis la bonan iradon de la mondo kaj ĝiajn perturbojn. Iliaj sonoj estis disharmoniaj plejofte. La Ketaj radoj havis 6-12 aŭ 24 radiojn ; por la Keltoj 12 estis suna nombro ; estas la nombro de la monatoj kaj ankaŭ de la zodiakaj signoj.



Rado de fortuno

Oni lokis ilin ofte sur la dekstra muro de la preĝejo, ĉe la mezo de la navo, kie grupiĝis la nesidantaj fideluloj, vid-al-vide al la ĉefa pordo. Tiuj sonoriletoj, kiuj ofte anstataŭis la harmoniumon en la malriĉaj preĝejoj, akompanis la kulton : Te Deum, Bapto Leviĝo. Sed okazis, ke ili partoprenis paganajn praktitkojn ; oni turnis la radon por gajni procesón, por kuraci surdecon kaj mutecon, por antaŭvidi la estontecon. En majo la infanoj ĝin turnis por voki St-Nikolaon. La unua de majo estis dediĉita al Belen, dio de la Suno. Oni plantis fagon, kiun oni dehakis kaj brulis en la 24-a de junio, festo de St Johano. En Agen, en Epinal estis flamigita rado, kiun oni ĵetis en la riveron de la supro de la montetoj. Malfavoraj al tiuj paganaj praktikoj, kelkaj parokestroj forprenis radon kaj sonoriletojn el siaj preĝejoj.

El Archeologia.

VOĈO EN LA TENEBRO

Lordino Barbara Norton enuis en sia skota kastelo ; ŝi preferis pasigi la someron en Nico. Kvankam 60-jara, kaj dank'al la beligejoj, ŝi estis svelta, eleganta, junaspekta ; ŝi estis kvarfoje edziĝinta ; tri edzoj eksedziĝis ; la kvara mortis. Nune ŝi flirtis kun 30-jarulo, kies ĉefa okupado estis ludi tenison. Sur la promenadejo ŝi renkontas sian malnovan amikon Mark Deneth ; ili ofte kune ludis dum siaj junaj jaroj : li estas ŝia kastelnajbaro.

— Mark, mia kara, ĉar vi reiras Skotlandon, faru viziton al Reĝina ; ŝi skribas al mi strangajn leterojn, kiuj parolas pri fantomoj kaj supernaturaj murmuroj. Mi trovas mian filinon iom stulta ; ŝi ne volis veni kun mi al Nico ; ŝi ne ŝatas danci kaj kunveni kun la gejunuloj, kiel la aliaj junulinoj ; ŝi preferas promeni kaj ĉasi en la kamparo. Mi petas vin, vidu tiun aferon kun Reĝina. Povas esti nur ŝerco ».

Barbara ne plu havis parencojn ; ŝia fratino Sofia mortis en mara akcidento ; kiam la ŝipo pereis, Barbara estis savita sed Sofia malaperis ; s-ino Alica Drume, ilia ĉambristino ankaŭ eskapis el la katastrofo kaj revenis kun Barbara. Lordino Barbara Norton estas tre riĉa ; ŝi heredis de sia patro grandan riĉaĵon kaj la titolon.

En la skota kastelo :

Mark Deneth aŭskultas Reĝinan ; ŝi estas freŝa, bonfarta, bela junulino :

« Antaŭ ĉirkaŭ du monatoj mi subite vekiĝis dum la nokto. Voĉo diris en la obskureco de mia ĉambro ». Redonu tion, kio ne apartenas al vi. Redonu tion, kion Barbara ŝtelis. « Mi rapide turnis la ŝaltilon sed estis neniu en la ĉambro. Mi ne reendormiĝis kaj 3 fojojn la voĉo ripetis la samajn vortojn, jen flustrante, jen kriante. Mi ektimis kaj mi petis la ĉambristinon, ke ŝi bonvolu tranokti sur la divano de la apuda salono.

— Ĉu vi denove aŭdis ion ?

— Jes, la sekvantan nokton, la voĉo mallaŭte flustris kaj Alica nenion aŭdis ; ŝi konsilis al mi viziti la kuraciston.

Por malstreĉiĝi mi rajdis en la kamparo la tutan tagon ; en la vespero mi estis tiel laca, ke mi tuj endormiĝis. Mi faris hororan premsonĝon ; mi estis grimpanta sur ĉirkaŭbarilo kaj paliso lante eniris en mian gorĝon ; ŝvitante kaj kriante mi vekiĝis ; la ĉambro estis tute nigra ; iu estis puŝanta ion pinta en mian kolon kaj diris : « Vi ŝtelis al mi tion, kio apartenas al mi, vi tuj mortos ». Mi tiel multe kriis kaj baraktis, ke la ĉambristino alkuris ; ŝi sentis ion preterpasantan apud ŝi ; ŝi vidis la vundon sur mia kolo.

— Kiuj personoj venis en la kastelon dum la lastaj monatoj ?

— Mia amikino Marta restis 3 semajnojn ; ŝi multe ŝatas rajde promeni kun mi en la regiono. Kaj ankaŭ Roĝero, mia kuzo ; li longe restadis ĉi tie dum la vintro.

— Ĉu li amas vin.

— Jes, li volus edziĝi al mi ; sed mi fianĉiĝis kun Nikolao Duran ; ni ofte kune promenas en la ĉirkaŭaĵoj.

— Se via patrino kaj vi mortus, al kiu irus viaj posedaĵoj ?

— La heredanto estus Roĝero.

— Kaj via ĉambristino, ĉu vi bone konas ŝin ?

Ho jes, ŝi estis jam ĉi tie, kiam Barbara kaj Sofia estis junulinoj ; ŝi revenis kun mia patrino post la mara akcidento.

La ĉambristino estis maljuna kun grizaj haroj kaj malbelaj cikatroj sur la vizaĝo. Ankaŭ ŝi timis ; ŝi pensis, ke io malbona estis okazinta en tiu domo, kaj tial la spektroj plendis dum la nokto.

Mark Deneth maltrankviliĝis ; certe io nebona estis preparĝanta ; ne estis nur ŝerco !

Iun tagmezon, Marta kaj Roĝero haltigis sian veturilon antaŭ la pordo de la kastelo. Juna virino, certe unu el iliaj amikinoj, ilin akompanis.

— Reĝina, diris Roĝero, ne plu timu, jen lerta mediumo ; ni baldaŭ ĉion scios. Evidente, ili ne vidis la gravecon de la afero kaj volis nur amuziĝi. Kvankam tute ne kontenta, Reĝina rezignaciis. La kunsido okazis en la libro-ĉambro. Oni tiris la kurtenojn antaŭ la fenestroj ; oni sidiĝis ĉirkau ronda tablo ; oni mallumigis la lampojn ; ĉiuj ĉeestis : Roĝero, Marta, Mark, la mediumo kaj la ĉambristino. Oni silentiĝis. La mediumo parolis : « El la transmondo, iu nepre volas paroli al Reĝina ». En la silento, flustranta voĉo lante diris : « Reĝina, Reĝina, mi estas via onklino Sofia, kiu malaperis kun la ŝipo. Atentu, atentu ! Redonu ĉion, kion Barbara ŝtelis. Redonu... ».

Mark Deneth intencis malmistifiki la parolanton kaj diris : « Sofia, momenton, ĉu vi memoras, kiu estis la « Renversita barko ? »

— Ho, jes, flustris Sofia ekridante, estis la nomo, kiun ni donis al S-ro Batarsi, kiam la ondoj renversis lian barkon ».

Ĉio silentiĝis, ĉiuj, mirigitaj, nenion diris. Mark pripensis : tiu evento estis okazinta 40 jarojn antaŭe. Neniu en la ĉambro povis ĝin koni. Neniu, krom... la ĉambristino.

Lordino Barbara telegrame anoncis sian revenon en la kastelon. Iun matenon, oni trovis ŝin morta en sia banujo.

Reĝina estis tre turmentita : « Mark, ŝi diris, la kuracisto eraris. Mia patrino ne svenis en la banujo ; oni mortigis ŝin. Mi estas certa ankaŭ, ke oni volas mortigi min. Tial mi refaris mian testamenton ; Mi ĉion donos al mia fianco Nikolao. Jen ĝi estas preta. Alica, la ĉambristino jam subskribis la dokumenton ; ĉu vi volas ankaŭ meti vian nomon ?

Mark Deneth subskribas kaj samtempe vidas la alian subskribon : SOFIA ! ! !

— Reĝina, ĉio estas finita, mi ĉion kompremis.

Alica ne estas la ĉambristino ; ŝi estas Sofia, la fratino de Barbara.

Kiam la ŝipo pereis, Barbara kaj Sofia eskapi en barko ; la ĉambristino mortis. Sofia havis kranian vundon, kiu perdigis al ŝi la memoron ; multaj vundoj sur la vizaĝo igis ŝin nerekonebla. Sofia estis la pli aĝa. Estis ŝi, kiu ĉion heredis post la morto de ilia patro. Barbara volis la bienojn kaj la titolon ; ŝi anoncis la morton de Sofia kaj prezentis sian ĉambristinon Alica.

Sed tiu ĉi, antaŭ kelka tempo, retrovis ĉiujn siajn memoraĵojn. Antaŭ ŝi estis Barbara, juna kaj riĉa. Kaj ŝi estis nur malbela servistino ; ŝi decidis sin venĝi kontraŭ via patrino kaj vi.

— La malfeliĉulino ,respondis Reĝina. Ni iru paroli kun ŝi. Sofia sidas en malgranda ĉambro, kie ŝi kutime kudris : ŝi restas senmova kaj glacia.

Mark Deneth alproksimiĝas al ŝi :
« ŝia koro haltis ».

DOROTA ZIEMINSKA

NOTO BIOGRAFIA

Mag. Dorota Zieminska nask. en Krakovo en 1937a jaro, post perdo de gepatroj, de 1943 estis edukita kaj adoptita filineto fare de fiktivaj gepatroj, geinstruistaj geedzoj : Maria kaj Bronislaw Zieminski. Ŝi finis Filologian Fakultaton ĉe Wroclava Universitato. 1960-1968 ŝi laboris kiel bibliotekistino kaj instruistino de la pola lingvo en XII-a Ĝeneralkleriga Liceo en Vroclavo, kaj de la jaro 1968 ŝi laboras en Humanista Biblioteko ĉe la Vroclawa Politekniko.

Konforme al ŝiaj studoj, ŝi interesiĝas pri literaturaj troblemoj, kunlaboras kun la Literatura Klubo ĉe la Sindikato de Polaj Instruistoj, partoprenas en multaj tutpollandaj literatoraj seminarioj, konferencoj ktp., organizitaj fare de la Ĉefa Estraro de la Sindikato de Polaj Instruistoj.

Dorota Zieminska publikigis siajn poeziaĵojn en periodaĵoj : « Kultura Dolnoslaska » (Malsupra-Silezia Kulturo) ; « Odglosy » (Reeĥoj) ; « Instruista Voĉo » (« Glos Nauczycielski ») ; « Sigma », « Glos Mlodziezy » (Junulara Voĉo, en Almanako) ; « Spojrzenia i Refleksje » (Rigardoj kaj pripensoj), k.a., prezentadis siajn poeziaĵojn en la Pola Radio en Vroclavo kaj Varsovio. Ŝian unuan volumon de poeziaĵoj baldaŭ eldonos la eldonejo de la Pola Akademio de Sciencoj « Ossolineum » en Vroclavo.

Heroso

al Paĉjo

enportis sub sian tegmenton la knabineton
kiel lekanton perditan sur pavimo
li
nememoranta
ke persekutas ŝin
centokula glavo de apokalipso
nememoranta
ke persekutos lin
la homon
kiu
al homo
la homo estis
la centokula glavo de apokalipso
enportis sub sian tegmenton la knabineton
dividis verdikton kiel hostion
Li.

Konjugacio

kiam tempo traflugas
de l'homo al homo
de l'aĵo al aĵo
de l'gesto en malkoncentriĝon
tra pado kaj ekster la padon
alten leviĝas ŝanelo
de tiu pejzaĝo
perfortita subtila
la birdo de l'penso
implike ŝtoniĝas
kaj de miro ŝvelas
jen ies rigardo ne forlasas min
per tremanta mano nun mi kaptas ĝin
la arbo aŭtuniĝas
aperas la stigmo naŭzanta
streĉodoloro
longe mi silentigas ĝin per vorto.

Al la Patrino
kiu ne estis ne estas kiu estas

okuloj vitraloj de la lum'
serenridetoj
hejmo de ekvilibro
dispremegita brulejo
kvankam vivigas ilin timoj de mia kuraĝo
bono naskas malbonon : mi deziras ami
karesemo elŝirita kun radiko
la tondroj en preĝoj
mi deziras absolvi
nur la ombroj de l'plendo
la ŝtono sur altaĵo de miaj kvar jaroj
nenio el papiliaj fabeloj
restis
la morto diskreskanta en frenezon
marĉando pri ĉiuj patrinoj
senhejmaj psalmoj de l'revoj
libero sen malarmigo de l'sango
ĝis kiam ombro mia kun Via kuniĝos
soleca voje al mia mio.

El la pola tradukis :
Jan Smykalski.

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬ PROBLEMO

La krado de la lastaj krucvortoj estis ne ĝuste presita ; Ni petas vian indulgon por tiu eraro kiu verŝajne multe laborigis vin, sed ni estas certaj ke vi povis rekonstrui la ĝustan kradon.

	A	B	C	D	E	F	G	H	I	J	K
1	E	T	A	T	■	G	■	E	F	I	K
2	P	A	R	■	L	U	K	■	I	N	O
3	O	R	■	R	A	B	I	O	■	T	R
4	S	■	F	■	F	E	O	■	E	■	O
5	■	K	A	N	■	R	■	O	V	O	■
6	C	I	B	E	R	N	E	T	I	K	O
7	■	S	E	P	■	A	■	A	T	A	■
8	A	■	L	■	U	T	A	■	I	■	P
9	N	I	■	I	Z	O	L	I	■	E	R
10	A	R	A	■	I	R	O	■	T	R	E
11	S	I	L	O	■	O	■	P	I	A	N

NOVAJ PROBLEMOJ

Ĉu estas eble ?

Bone legu tiun frazon : « En iu vilaĝo, neniu enloĝanto portas barbon ; la plejmulto sin rasas mem, kaj la razisto (enloĝanto de la vilaĝo) razas ĉiujn virojn kiuj ne sin razas mem ». Ĉu vi trovas eraron en tiu frazo ?

Al kiu apartenas la zebro ?
(sendita de S-ro Masclet)

1) Estas 5 domoj.

2) La Anglo loĝas en la ruĝa domo.

3) La Hispano havas hundon.

4) La loĝanto de la verda domo trinkas kafon.

5) La Ruso trinkas teon.

6) La verda domo staras dekstre de la ebura domo.

7) La fumanto de « Old Gold » bredas helikojn.

8) La loĝanto de la flava domo fumas « Gauloises ».

9) La loĝanto de la meza domo trinkas lakton.

10) La Norvego loĝas en la unua domo.

11) La fumanto de « Chesterfield » loĝas apud la proprietulo de la vulpo.

12) La fumanto de « Gauloises » loĝas apud la proprietulo de la ĉevalo.

13) La fumanto de « Lucky Strike » trinkas oranĝan sukon.

14) La Japano fumas « Gitanes ».

15) La Norvego loĝas apud la blua domo.

DEMANDOJ :

Al kiu apartenas la zebro ?

Kiu trinkas akvon ?

KRISTNASKAJ DONACOJ

La avo de Johanino, Lizbeto kaj Karolino tute ne estis avara kiam temis pri kristnaskaj donacoj por la nepinoj. Tiun jaron li decidis ke li donacos al ĉiu el siaj tri nepinoj tiom da 5-stelaj moneroj ol ŝi havis da jaroj en sia aĝo. Unu el la nepinoj tuj rimarkis ke ŝi ricevis la saman sumon ol la du aliaj kune. Kelkaj jaroj poste, alia nepino konstatis ke ŝia sumo estis la duono de la tuta sumo ricevita de la du aliaj kune. Dum la lasta kristnaska festo, unu el la tri nepinoj estis 21 jara. Sed tiam la tri nepinoj konstatis ke la nombro de jaroj de post la komenco de tiuj donacoj estis la du trionoj de la nombro de la 5-stelaj moneroj donacitaj la unuan fojon.

Kiu estis la aĝo de la tri nepinoj dum la lasta kristnaska festo ?

DIVIDO PRESKAŬ SEN CIFEROJ

Tiu malfeliĉa Fransciko venis ploranta al sia patro. Li portis paperpecon kiu havis strangan aspekton. La patro neniam vere sciis kio okazis, sed li tamen komprenis ke la knabo estis faranta dividojn kiam okazis « akcidento ». Li ĵus estis fininta unu kaj jen kio restas el tiu divido

```
XXXXXXX | XX
XXX     | XX8XX
---
  XX
  XX
  --
  XXX
  XXX
  ---
    1
```

La X montras la lokon de ciferoj kiujn oni ne plu povas legi. La patro, kiu estas matematikulo tuj vidas ke oni povas retrovi ĉiujn ciferojn. Ĉu vi ankaŭ povas reskribi la dividon ?

GRAMATIKO PER BONHUMORO

VERBAJ FUNKCIOJ DE SUBSTANTIVO

I **SUBJEKTO** : la **ĉielo** estas blua.

II **VERBO-KOMPLEMENTO**

1) **Objekto - komplemento**

— **rekta** : mi manĝas **panon**
— **nerekta** : mi skribas **al mia amiko.**


2) **Aganto - komplemento**

la arbo estas elradikigita **de la vento.**

3) **Adjekto** (cirkonstanca komplemento) : la cikado kantis **sur la arbo, pro la varmo, dum la tuta somero.**

III **PREDIKATIVO**

— **de la subjekto** : la patro estas **tajloro**
— **de la komplemento** : ne nomu min **reĝido.**



Ofendo al beleco

Ho, Arturo, mi sentas en mi ĝenon ; ĉu la estontaj generacioj imagos nin tiaj ?



La horoj sekvas sed tute ne similas unuj la aliajn.

Oskaro, aŭskultu min momenton ; certe via lernejula kostumo okazigis al vi multe da sukcesoj sed nun estas jam la 6-a matene, kaj Peter bezonas sian sakon kaj siajn librojn por iri al lernejo.



La vizito estas finita

Kiun ŝancon vi havas hodiaŭ, sinjoro Izidoro. Ne nur vi profitis la ĉeeston de via edzino kaj de viaj infanoj, sed plie vi admiris la televidan spektaklon.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (80 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux. BARCHON, Lg. (160 fr.).

Britujo : S-ro John Rapley, 156, Wanstead Park Rd., ILFORD, Essex IGI 3 TP, ĝiro 50 292 3008 (160 p.).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (25 kr.).

Finnlando : S-ro Jussi Jäntti, Esperantotie 4, SF 02220 IRISLAHTI (16 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (10 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (240 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Affieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (2 000 lires).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 200 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (60 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk. 209721 (10 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (24 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, al. Valea Rosie 4, ap. 69, B.P. 8/4 BUKURESTI - 66.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (18 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (14 fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO Box 1231, BANGKOK (5 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (5 dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie **Coconnier** **Le Gérant : P. BABIN**

Supplément au n° 6 de 1974, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Dans le précédent numéro j'ai écrit que l'horizon n'était pas noir mais gris. Il est resté gris. Le bilan final et l'incertitude qui plane sur 1975 vont probablement nous obliger à suspendre provisoirement nos investissements. La grève des P.T.T. nous a empêchés de commencer notre propagande suffisamment tôt. Notre calendrier de stages ne paraîtra dans les revues qu'en janvier. Quel accueil lui sera fait ? Bon, nous l'espérons. Mais il nous est impossible de faire des projets de dépenses pour un avenir aussi brumeux.

Un autre point nous tracasse. Les équipes responsables des stages ne sont pas assez nombreuses. Certaines s'essouflent. Il faudrait que quelques autres couples se décident à entrer dans la ronde pour assurer un stage de temps à autre. Surtout que l'un de ces couples devra un jour prendre le relais de la direction de la MCE. Un « apprentissage » est nécessaire. Il doit bien exister ce couple qui acceptera de parcourir ce chemin que d'autres ont parcouru avant lui. Qui acceptera de travailler chaque jour pour Gresillon et de retourner dans sa tête, la nuit, les problèmes qui se posent ; qui acceptera d'avoir parfois l'impression d'être « noyé » mais arrivera sans trop de difficultés, pendant un certain temps du moins, à faire face ; qui s'efforcera de maintenir l'équilibre entre la vie de famille et la vie de Grésillon. Tableau peu encourageant ? Non car il ne s'agit là que de l'envers. Le côté face du tableau c'est la joie de conduire ensemble une œuvre que d'autres ont eu l'audace de créer ; de lire dans les yeux des amis retrouvés qu'on leur a, au moins une fois, apporté quelque chose d'agréable ou d'enrichissant ; de recevoir de nombreux témoignages d'amitiés qui compensent amplement les quelques fausses notes venant de ceux qui oublient de laisser leurs exigences à la porte en entrant dans la communauté du château ; de savoir enfin que l'on contribue, non pas du haut d'une tribune mais au ras du sol, à hauteur d'homme, à faire aimer l'Esperanto, à faire comprendre l'esprit qui l'anime.

C'est ça travailler pour Grésillon.

P. BABIN.

La revue

Nous ne faisons pas paraître cette fois de liste d'abonnés bienfaiteurs car depuis le 20 octobre nous avons reçu très peu de versements, les chèques postaux distillant les envois depuis quelques jours seulement.

Mettez-vous rapidement en règle de vos abonnements 1974 vous nous rendrez service. Faites un effort : si tous nos abonnés versaient la somme de 20,00 francs au moins nous n'aurions pas de gros problème actuellement. N'oubliez pas que le papier a doublé de prix et les tarifs postaux également. Réglez aussi le plus tôt possible vos abonnement 1975. Merci.

★

Monsieur et Madame Babin remercient tous les amis qui leur ont adressés leur vœux et les prient de les excuser de ne pouvoir répondre à tous.

Nos joies

Hervé Gonin, membre du bureau de U.F.E., fils de M. et Mme Raymond Gonin, de Villeurbanne, eux-même très connus dans le mouvement espérantiste, a épousé Jacqueline Lapiere le 31 décembre. Tous nos compliments et nos vœux de bonheur bien amicaux.

★

M. et Mme Turin, nos amis de Pontarlier sont à nouveau grands-parents d'une petite Muriel cette fois. Tous nos compliments.

★

Nos compliments également à Gesroj Berveling, heureux parents d'une seconde fille, Edelka, ainsi qu'à la grand-mère S. ino Van der Kooij.

Nos peines

Notre vice-présidente, Madame Cheverry a perdu sa mère au début du mois de janvier. Qu'elle veuille bien accepter nos affectueuses condoléances.

★

Madame Kraemer, épouse de M. Joseph Kraemer, grand ami de Grésillon, est décédée le 23 décembre. A M. Kreamer et à sa famille nous adressons toute notre sympathie.

Commandez vos livres à notre Libro-Servo, c'est encore nous aider.

Achetez nos éditions :

Calendrier perpétuel - Pendentifs - Porte-clés
Cuillers souvenirs - Cartes postales

ASSOCIATION CULTURELLE
DU CHATEAU DE GRESILLON
Adhésion simple : **5 F.**
C.C.P. 2512 17 Nantes

LISTE DE DONATEURS (suite)

Carré (69)	20,00
Raynaud (30)	10,00
Thiers Esperanto (63)	15,00
Dessapt M. (63)	5,00
Dessapt J.-P. (63)	5,00
Kristos A. (63)	5,00
Kristos J.-L. (63)	5,00
Mayet (63)	5,00
Bois (63)	5,00
Brunet (63)	5,00
Foyer Culturel Esperanto (13)	14,00
Ferrut (35)	20,00
Fédération esperantiste Provence	400,00
Charlet (80)	5,00
Reymond (13)	10,00
Andresson	15,00
Turquet	10,00
Llorens (06)	5,00
Chaumereuil (75)	30,00
Doriac (76)	10,00
Groupe de Baugé (49)	100,00
Girard (23)	10,00
Guirault (86)	10,00
Dutour (72)	5,00
Fontanier (69)	5,00
Anonyme	10,00
Lenel (22)	10,00
Labatte (80)	10,00
Lentaigne (34)	5,00
Benaïm (47)	5,00
Anonyme	48,06
Drillien (71)	5,00
Mac Lennan (G.B.)	10,00
Cantel (17)	10,00
Armantier (31)	10,00
Pinay (63)	30,00
Boissou (75)	10,00
Bellon (06)	50,00
TOTAL	**942,06**

CONSEIL D'ADMINISTRATION DU 27-10-74

La séance est ouverte par le président à 10 h. 15. Sont présents : Mmes et MM. Babin, Baudereau, Berthelot, Boyet, Cheverry, Ciret, Dairon, Guillaume, Guillot J.-P., Jelenc, Mathé, Métivier, Micard, Philippeau, Prévot.

Sont excusés : Mmes et MM. Bénistant, Coussé, Jacqueson P., Vazon.

I. — STAGES DE L'ETE 1974

Il y a eu cette année trois stages de trois semaines.

Premier stage. — M. et Mme Babin : comme cette année également les rencontres d'enseignants esperantistes. Il y avait de 60 à 70 personnes pendant la première semaine et 90 pendant les deux autres. Cours et examens se sont déroulés comme par le passé, malgré un nombre plus limité de jeunes.

Deuxième étage. — M. et Mme J.-P. Guillot : semaines internationales : 40 participants et beaucoup de passages ; âge moyen assez élevé ; sept ou huit nationalités représentées. Le programme culturel du stage était « l'homme et la machine » ; Mmes et MM. Babin, Cheverry, Guillot, Kristos, Chasseriaud, de Waard, E. Lemagadure, Masclet, Métivier ont fait des exposés sur les thèmes suivants : la machine, moyen d'apprentissage des langues ; le jacquard ; les corporations ; l'enseignement de l'Esperanto par la machine ; le compagnonnage ; les ordinateurs ; les moulins à vent ; les machines et la pollution ; la machine et la parole ; la science et la machine. Ce programme a intéressé les participants ; la formule, souple, semble être à garder.

Troisième stage. — M. et Mme Dairon : cours et excursions bien suivis mais le public était trop restreint (65-55 personnes) ; beaucoup d'étrangers de passage.

En septembre. — Congrès national des cheminots esperantistes avec quelques étrangers.

II. — APERÇU FINANCIER APPROXIMATIF POUR 1974

Recettes :

— Séjours : environ 125.000 F (accroissement de 13.000 F par rapport à 1973 mais pour un nombre de journées inférieur).

— Tickets - ventes + 1.000 F pour une consommation identique.

— Souvenirs, librairie, activités culturelles, chiffre égal à 1973.

Dépenses :

— Alimentation : environ 38.000 F : sensiblement le même chiffre qu'en 1973 ; cela étant dû uniquement au nombre inférieur de repas servis.

— Salaires : en augmentation de 15 % (le SMIC a augmenté de 32 %).

— Investissements : seront sensiblement les mêmes qu'en 1973.

Disponibilités :

C.C.P. environ	20.000 F
Banque	30.000 F
Caisse d'épargne	6.500 F
Caisse	4.000 F

M. Dairon demande quelle est la somme minimum nécessaire pour faire fonctionner le château en cas de crise économique grave.

M. Babin répond par les chiffres suivants :

Impôts	3.000 F
Assurances toutes sortes	1.500 F
Remboursements, abonnements	500 F
Salaires (au 31-12)	33.000 F
Electricité, chauffage, eau	5.500 F
soit	43.500 F

III. — ACTIVITES 1975

PAQUES (22 mars - 7 avril) :

Organisation : MM. Babin, Lemagadure.

1re semaine : rencontre d'enfants de 9 à 13 ans ; 15 à 20 français avec des anglais, allemands, italiens, tous esperantistes + accompagnateurs.

2e semaine : travail de recherche pédagogique.

ENTRE PAQUES ET JUIN :

Un week-end Delaire.

Une ou deux rencontres.

Un week-end en mai : Mme Cheverry avec le groupe d'Angers.

ÉTÉ :

Trois périodes de trois semaines.

Début mardi 1er juillet.

1er stage : mardi 1er juillet - lundi 21 juillet.

2e stage : mardi 22 juillet - lundi 11 août (possibilité de rencontre internationale des cheminots).

3e stage : mardi 12 août - lundi 1er septembre.

IV. — QUESTIONS DIVERSES

Travaux exécutés : tapisserie de l'escalier et du hall d'entrée, salle de spectacle.

Travaux envisagés : cloison entre les chambres 4 et 5 ; peinture W.-C.

Tarifs :

Les tarifs des cours par correspondance sont modifiés de la façon suivante : 60 F au lieu de 50 F pour les 1er et 2e degré, 40 F pour le 3e degré.

Tarifs séjours pour Pâques (plus de 3 jours).

Chambre 1 personne	40 F.
Chambre familiale	36 F.
Chamber commune	30 F.
Campeurs	28 F.
Enfants 3 à 6 ans	18 F.
Enfants 1 à 3 ans	10 F.

Prix susceptibles de révision pour l'été.

La séance est levée à 16 heures.

Le secrétaire de séance :
F. Mahé

Maison Culturelle Espérantiste

Programme 1975

PAQUES

1) — **Arrivée Dimanche 23 Mars. — Départ Samedi 29 Mars.**

Rencontre de jeunes espérantistes de différents pays

(Enfants de 9 à 13 ans accompagnés)

Cours — Activités diverses

Pour les adultes : « Pédagogie de l'Espéranto »

Causeries — Débats — Cours suivis de discussions — Soirées récréatives

2) — **Arrivée Dimanche 30 Mars. — Départ Samedi 5 Avril.**

Pratique et expression

Pratique de la langue — Grammaire et expression — Soirées récréatives

ETE

1) — **Arrivée Mardi 1er Juillet. — Départ Lundi 21 juillet.**

Semaines Esperantistes

Cours des 3 degrés — Examens — Activités manuelles.
Excursions et visites — Soirées récréatives.

2) — **Arrivée Mardi 22 Juillet. — Départ Lundi 11 Août.**

Semaines Internationales

Conférences. — Discussions. — Excursions — Soirées récréatives.

3) — **Arrivée Mardi 12 Août. — Départ Lundi 1er Septembre.**

Semaines d'Etude

Cours des 3 degrés — Examens — Activités manuelles.
Excursions et visites — Soirées récréatives.

Inscriptions rapides conseillées à :

MAISON CULTURELLE ESPÉRANTISTE
Château de Grésillon - 49150 BAUGÉ